

Vivo en Esperantujo

Claude Gacond, 67-a radioprelego, 1964.03.11 & 14

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la vivo en Esperantujo ! Vi aŭdas Claude Gacond.

En pasinta novembro, okaze de grava manifestacio de Esperanto-Edukistaro de Svislando, mi havis la eblecon munti belan ekspozicion pri la vivo kaj verkaro de Edmond Privat. Belaj grandaj fotografaĵoj prezentas la knabon 7-jaran, kiu ludas, la gimnazianon 13-jaran, kiu ĵus lernis esperanton, la organizanton de la dua Universala Kongreso, kiu nur estas 17-jara, la junulon 18-jaran, kiu, post kunlaboro al la organizo de la tria Universala Kongreso en Kembriĝo, vizitas la prezidanton Teodoro Roosewelt en la Blanka Domo kaj disvastigas esperanton tra tuta Usono. Ni poste vidas Edmond Privat, kiu partoprenas kun sia edzino laborejon de Internacia Libervola Helpservo, kiun ĵus fondis Pierre Céréssole, ni vidas la dometon *La Chaumière*, kie Edmond Privat skribas siajn librojn, kaj jen la granda renkonto kun Mahatmo Gandhi. Edmond Privat en 1931 akompanas ĝis Hindio sian grandan amikon, kiu tiam estras la neperfortan lukton de sia popolo al sendependiĝo. Ni vidas, ke post la sendependiĝo de Hindio sinjoro Nehru vizitas Edmond Privat en Svislando. Aliaj bildoj prezentas la verkiston, la prelegiston, la pensiston. Multaj pensoj kaj citaĵoj vivigas tiujn fotojn, kaj ekzempleroj de preskaŭ ĉiuj libroj de Edmond Privat altiras la atenton de la vizitantoj.

La 19-an de februaro mi iris prezenti tiun ekspozicion en Bellinzona en la itala parto de Svislando. Dum 15 jaroj Edmond Privat instruis en la Supera Komerca Lernejo de tiu urbeto la francan kaj la anglan lingvojn kaj la anglo-saksan civilizon. Mi povis konstati, kiom da personoj konservis grandan estimon al li per la simpatia atmosfero, kiu regis dum mia franclingva prelego pri la vivo kaj penso de Edmond Privat.

La postan tagon mi iris al Como ankaŭ prezenti tiun ekspozicion kaj mian prelegon. Ĵurnalisto intervjuis min kaj la esperantistaro vigle interesiĝis pri la penso de nia granda forpasinta samideano.

Poste la 29-an de februaro mi devis prezenti la ekspozicion al la estontaj instruistoj de la kantono Neuchâtel. Neniam mi estus pensinta, ke 40 gestudentoj povus tiel rapide entuziasmiĝi por afero al ili ĝis tiam nekonata. Post mia prelego, kaj dum preskaŭ duonhoru la demandoj pri esperanto, mondanismo kaj la UEA-delegitaro pruvis, ke la momento diskonigi nian kulturon ekvenis.

Nun tiu ekspozicio troviĝas en la biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds, biblioteko, kiu rikoltis la manuskriptojn de la franclingvaj libroj de Edmond Privat. La esperantaj manuskriptoj troviĝas en la Esperanto-Muzeo en Vieno. Dum la porgazetara konferenco, kiu inaŭguris la prezenton de tiu ekspozicio, la ĵurnalistoj montris ege grandan interesiĝon pri la vivo de Edmond Privat kaj liaj idealoj. Tiu konferenco daŭris unu horon pli ol antaŭvidite pro la senlacaj demandoj rilate esperanton.

Ne kredu, ke mi rakontas al vi pri tiu ekspozicio por fanfaroni pri mi. Mi simple volis atentigi vin pri ĝia ekvojaĝo kaj pri la sukceso, kiun ĝi renkontas ĉie, kie ĝi pasas. Per ĝi la agado de nia granda samideano kvazaŭ ne ĉesis. Per ĝi diskoniĝas en kleran publikon nia lingvo, mondanismo kaj la neperfortaj ideoj. Ĉar tiuj idealoj respondas al granda hodiaŭa soifo, ili vekas neatenditan entuziasmon, kiu sin esprimas ne nur per belaj paroloj, sed ankaŭ per aĉeto de centoj da libroj kaj esperanto-gramatikoj. Mia espero estas, ke multaj grupoj uzos tiun ekspozicion en la kadro de sia kultura vivo. Nia radio, kies prelegisto estis Edmond Privat, volonte respondos al viaj demandoj pri tiu afero.

La 15-an de februaro Esperanto-Junularo de Svislando renkontiĝis sur unu el la plej altaj suproj de la ĵuraso montaro, sur la Monto Chasseron. Ĉiuj partoprenantoj alkuris kun siaj skioj kvankam la neĝo preskaŭ ne plu ekzistis. Seĝlifto permesis atingi rapide grandan altecon kaj

Vivo en Esperantujo

Claude Gacond, 67-a radioprelego, 1964.03.11 & 14

agrabla duonhora promonado sur monteĝo permesis admiru vesperiĝan vastan pejzaĝon, kiu vastis de Alpoj al Pontarlier. Tre fiere enĉielis Monto Blanka kaj centoj da aliaj belaj alpaj suproj dum norde entendiĝis la molaj arbarkovritaj paralelaj ĵurasaj suproj.

Post manĝo de fonduo en monta hoteleto ĉiuj aŭskultis kun granda intereso la junan prezidanton Tazio Carlevaro prelegi pri interlingvistikaj temoj. Tiu 19-jarulo montriĝis talenta prelegisto kaj tre dokumentita fakulo. Li kapablis vekti tiom da entuziasmo, ke ĝis meznokte demandoj sekvis demandojn.

Dimanĉon matene la skiemuloj trovis ne multe da neĝo sed tre agrablajn skiejojn. Posttagmeze, ĉar oni troviĝas en horloĝeja regiono, ni vizitis en la vilaĝo L'Auberson apud Sainte-Croix interesan muzeeton pri aŭtomataj muzikiloj. Ni admiris kantantajn birdetojn, plej diversajn muzik-skatolojn, kiuj trumpetas aŭ akordionas.

Tiuj renkontiĝoj de Esperanto-Junularo de Svislando, kiuj okazas proksimume ĉiumonate, ebligas al komencantoj ekpraktiki la lingvon. La celo de tiuj renkontiĝoj ne estas grupigi multajn partoprenantojn. Tiam oni ne povus eviti ariĝon de la komencantoj, kiuj aŭtomate krokodilus. La celo estas devigi ĉiujn praktiki dum tuta semajnfino esperanton. Tiu volo esprimiĝas per la sinteno de kelkaj lertaj esperantistoj, kiuj sisteme fermigas la buŝon de la krokodiloj. Dank'al tio la komencantoj rapide fariĝas viglaj babilemuloj. Novaj amikecoj naskiĝas, kaj ĉiuj ĉe la fino de la dimanĉa posttagmezo bedaŭras, ke semajnfino tiel rapide forpasis.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond parolis pri la vivo en Esperantujo !

Ĝis reaŭdo !

-oOo-